


Trimestriel
4^{ème} trimestre
2012



N° 160
31 décembre
2012



l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières



esperanto
France-Est



esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale
ESPERANTO
regroupant
les départements
Bas-Rhin (67)
Haut-Rhin (68)
Meurthe-et-Moselle (54)
Meuse (55)
Moselle (57)
Vosges (88)
Maison des Jeunes
et de la Culture
"Philippe Desforges"
27, rue de la République
FR – 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO
annuel / jara
15 €
eksterlando
18 €

Un festival réussi !
« Pour un plurilinguisme
de bon aloi »




Photo A. Grossmann

Fin octobre l'association *Euro-Afrika-Solidarité* avait invité la population de COLMAR à un grand festival des langues. L'organisateur, Monsieur Fernando NKANI avait invité deux conférenciers congolais, Messieurs *Sene MONGABA* et *Jozefo CHIRIMVANI SIRONGE*, ainsi que Monsieur *Gérard CRONENBERGER*, le maire de la ville voisine de INGERSHEIM, qui fut le premier maire d'Alsace à ouvrir une école bilingue.


Eh bien, chers concitoyens français ! Nous avons du chemin à parcourir en matière de plurilinguisme, car de nombreux amis africains parlent couramment une ou deux langues africaines, ainsi que deux ou trois langues européennes ! Ils sont plusieurs à Colmar à avoir ajouté l'espéranto à la palette de leurs langues !

Quel dynamisme ! Il suffisait d'ailleurs d'écouter et de voir danser les musiciens du groupe MBONDA KONGO ! C'était carrément de la dynamite !!!

A l'intérieur de ce bulletin, un compte-rendu exhaustif du festival pour nos lecteurs espérantophones.



Heureuse et fructueuse année 2013 à nos fidèles lecteurs !

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alian Collignon	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr
Abono al La Informilo →	Francio: 15 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo	
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de	
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte	
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier	

SOMMAIRE

1 page frontale	15 staĝo Ortenberg - raporto
2 ours	16 atesto
3 angulo de la prezidanto	17 libroservo
4 printempa staĝo	18 ni gratulas
5 id	19 Nadzjeja (2)
6 id	20 nos cotisations 2013
7 hotelo Eo	21 abonoj kaj kotizoj
8 St-Mihiel ekskurso	22 ni provu rideti
9 fotoj S-M kaj Rumanio	23 distra angulo
10 lom pri la staĝejo BV	24 el nia fototeko
11 tra Rumanio (somere)	
12 festivalo Colmar	
13 id	
14 staĝo Nilvange	

ISSN 0291 6037 trimestriel

N° CPPAP : 0409 G 83517

bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle**Espéranto France-Est**MJC PhiJippe Desforges – 27 rue de la République
54000 NANCYDirecteur de la publication : **Edmond LUDWIG**Rédacteur : **PoI DENIS**Dépôt légal : **31 décembre 2012**

Imprimé par l'imprimerie de l'encre

55000 Hargeville-sur-Chée

 angulo de la prezidanto

Estimataj gesamideanoj !



La kalkulo facilos por vi ! Dividu 160 per 4 kaj vi obtenos 40 ! Sed mi traduku: 160 estas la numero de tiu ĉi "LA INFORMILO". 4 estas la nombro de la trimes-troj en unu jaro. Sekve necesis 40 jaroj da laboro por realigi 160 sinsekvajn nu-merojn de nia regiona Esperanto-revuo !

Imagu la ĉiufojan angoron de la ĉefredaktoro antaŭ la unuaj malplenaj paĝoj ! Sed angorado ja neniel helpas por ilin plenigi ! Necesas ĉiufoje eklabori por kolekti informojn, peti, eĉ petegi por ricevi raporton pri aranĝoj, enpaĝigi, zorgi pri la presado kaj finfine enkovertigi kaj dissendi.

Imagu !!! Senpaŭze dum 40 jaroj ! Kaj malgraŭ tiu senĉesa formika laboro, tiu nia fidela ĉefredaktoro gardas sian legendan humuremon !!!

Kara Pol ! Nome de ĉiuj gelegantoj mi vin dankegas !

Edmond LUDWIG

à noter d'urgence sur votre agenda 2013 !

73^{ème} stage-rencontre international d' Espéranto France-Est

les 15 / 16 / 17 mars 2013
au « Centre d'Accueil » de BENOITE-VAUX

Au cœur du département de la Meuse, à 7km de la gare TGV, à 20km de VERDUN, « Benoîte-Vaux accueil » nous offre hébergement, restauration, équipement technique.

A l'intérieur de ce bulletin, avec un premier regard sur le site, ancien prieuré du 12^{ème} siècle, « modernisé 2013 », à destination de nos lecteurs espérantophones, un document informatif exhaustif avec votre fiche d'adhésion !



Nous mettons à votre disposition le site internet de notre association *Espéranto France-Est*
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

également accessible par

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vous serez informé non seulement sur l'histoire et sur la vie actuelle de notre association, mais encore sur les activités des groupes locaux, sur les initiatives des espérantophones isolés ...

et sur l'Espéranto en général ! Egalement à votre disposition la liste actualisée de notre « libro-servo » !

Plusieurs liens vous permettront de découvrir d'autres sites originaux en France et dans le monde.


Notre rubrique "albums photos", complétée en permanence, vous offrira un panorama original des événements régionaux et ... extérieurs !

une visite s'impose !

esperanto

France-Est

**En amikaj rilatoj
kun BAVELO
invitas vin al la :**




**73a Regiona Staĝo de Esperanto
la 15 / 16 / 17-ajn de marto 2013
En la Domo Centre d'Accueil
55220 BENOÎTE-VAUX**

Prelegoj

Asocio kun tiel impona LIBROSERVO nepre promociu la originalan Esperanto-literaturon. Proe ni invitas vin al la prelegoj de Anne JAUSIONS, kiu prezentos al vi panoramon de niaj originalaj literaturaĵoj.

Turismado al Saint-Mihiel

23 km 30 mn



**La libroservo proponos
siajn 680 titolojn dum la
tuta staĝo**

Provizora Programo:

Vendrede 15-an de marto 2013

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti la preĝejon de la abatejo de Benoîte-Vaux
- 19a30 Vespermanĝo
- 21a45 Malfermo de la knajpo.

Sabate 16-an de marto 2013

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Turismado al Saint-Mihiel
 - Du tre konataj skulptaĵoj de Ligier-Richier
 - muzeo pri religiaj artaĵoj
 - altranga biblioteko : bela loko, raraj libroj
 - domo de la reĝo
 - kvartalo de la 18-a jarcento
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de la alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj A, C, kaj E.
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero kun Marie LIEBY
- Knajpo

Dimanĉe 17-an de marto 2013

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, C, kaj E
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Ĝenerala asembleo de GEM. Groupe des Espérantistes Meusiens
- Poste: disiĝo

Juna muzika talento, la freŝbakita esperantistino-artistino Marie LIEBY kantos por ni en Esperanto kaj alilingve kaj ankaŭ malkovrigos al ni plej diversajn musik-instrumentojn

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

François Xavier GILBERT
33, rue Louvière -
FR - 55190 VOID-Vacon

Ĉekoj kaj ĝiroj je la nomo de:
GEM 27 32 X Nancy

Internaciaj ĝiroj al
GEM IBAN:

FR54 2004 1010 1000 0273 2X03 175
BIC: PSSTFRPPNCY

Por Germanio al nia peranto:
je la nomo de: Hans-Dieter Platz.
(menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:
918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA
Ludwigshafen

KURSOJ

A: Komencantoj (débutants)

Cours pour débutants par Ginette Martin. Elle apportera le matériel adéquat.

C: Progresantoj :

Paroliga kurso tute en esperanto.
Gvidas Edmond Ludwig

E: Seminario:

Prelegoj de Anne JAUSIONS , kiu prezentos niajn plej eminentajn originalajn literaturaĵojn kaj ties aŭtorojn.



Aliĝilo por la 73a Regiona Staĝo de Esperanto en Benoitte-Vaux la 15/16/17ajn de marto 2013

S-ro S-sino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ-kotizo	Elektita kurso
1 50	MILÉ	J. M. M. M.	ĉef-aliĝanto	25	C
2			kun-aliĝantoj		
3					
4					
Adreso					

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la dokumentoj disdonataj dum la staĝo (signu) Mi preferas vegetaran manĝon (signu)

Telefono: 03 29 89 82 15 Ret-adreso:

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: €
 per ĉeko per ĝiro al GEM 27 32 X Nancy
 per internacia ĝiro al nia peranto en Germanio
 Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

R e z e r v a d o j

Nombro da manĝoj kaj tranoktadoj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tagmanĝo		1	1
Vespermanĝo		1	
hotela ĉambro 1-lita		1	
hotela ĉambro por paro			
Normala 1-lita ĉambro		1	
Normala 2-lita ĉambro			
Preferata kunloĝanto :			
Kolektiva ĉambro			
Lito-tukoj (se ne inkluzivitaj)			
Kompleta restado			
Sumo pagenda =			

La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero.



Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

Por pliaj informoj :
 benoitte-vaux@orange.fr
 Tel. 03.29.89.82.15
 Daŭre aktualigitaj informoj:
 http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr

ALIĜOJ	Antaŭ la 1-a de februaro 2013	Ekde la 1-a de februaro 2013
Ĉef-aliĝanto jam abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio	20 €	25 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilon"	35 €	40 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	15 €	20 €

RESTADO		
kategorio	litotukoj ĉambro	por 1 persono kaj 1 nokto
hotel-komforta ĉambro kun maten-manĝo duŝo kaj necesejo en la ĉambro	inkluzive individua por paro=1 lito	28 € 21 €
normala ĉambro kun maten-manĝo duŝoj kaj necesejoj troviĝas en la koridoro,	inkluzive individua kun 2 litoj	20 € 17 €
kolektiva ĉambro kun maten-manĝo	5 eŭroj	12 €
kompleta restado = verspermanĝo + tranoktado + tagmanĝo	6 aŭ 8 personoj	28 €
1 manĝo kun 1 trinkaĵo		12 €
Simpla manĝo en korbo		7 €

Certe gastigema ... Do vizitinda ! Hotelo « Esperanto » en BĴALISTOKO



La 8an de novembro 2012, en BĴALKISTOKO, estis malfermita nova, tri-stela hotelo *Esperanto*.

Ĝi situas en la centro de la urbo, je 200 metroj de la palaco *Branicki*, vid-a-vide al la granda parko *Planty*. La nova hotelo ofertas 36 lokojn en dultaj ĉambroj, kaj en du apartamentoj, "*Zamenhof*" kaj "*Kawelin*", kaj apartenas al la firmao *Casablanka*, kiu posedas ankaŭ la kafejon *Esperanto* en la urboplaco de la naskiĝurbo de la aŭtoro de Esperanto.

La urbestro de Bjalistoko, *Tadeo Truskolaski*, en la solena malfermo de la hotelo diris Esperante ... "*Ni, loĝantaro de Bjalistoko, estas fieraj pro la fakto, ke ĝuste en nia urbo naskiĝis Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto*". El la tuta mondo venis gratulmesaĝoj al *Justyna Lewkowicz*, la estro de la hotelo.

Fine de la solenaĵo okazis lotumado, dum kiu nia volontulino *Arina Osipova* gajnis la eblecon tranokti senpage en la apartamento *Zamenhof*, kaj la aŭtoro de ĉi tiu artikolo, ricevis kuponon por senpaga dupersona vespermanĝo en la eleganta restoracio *Kawelin*.

Bedaŭrinde, pro la paneo de la malmola komputila disko kun preparita Esperanto-materialo, dume mankas Esperanto-versio de la hotela retejo, sed *Przemek Wierzbowski* promesis solvi rapide la problemon.

Elżbieta Karczewska



... malaperis famulo ...



Harry Maxwell HARRISON (naskiĝis la 12-an de marto 1925, en Stamford (Konektikuto), mortis en Crowborough (Anglio) la 15-an de aŭgusto 2012) estis usona verkisto, eksprezidanto de Monda Socio de Sciencfikcio (World SF), internacia organizaĵo de sciencfikciaj verkistoj kaj redaktoroj.

Li estis pacifisto, esperantisto, lernis Esperanton en sia junaĝo, estis membro de UEA jam ekde 1945 kaj estis ano de la Honora Patrona Komitato de UEA.



LEGO! GOJO!

En ĉiuj liaj libroj Esperanto nepre aperas. - INVADO:TERO estas romano sciencfikcia, pacifisma, facile legebla - Tradukis Mikaelo Ĉertilov - 160 paĝoj. Mendebla ĉe libroservo de UEA



... en la kadro de nia printempa, internacia renkonto ...

Benôite-Vaux : 16/17ajn de marto 2013

nepre enpartopreninda ekskurso !

Esperanto-France-Est bonvenigas vin en SAINT-MIHIEL dum agrabla ekskurso. Ni retrovos en tiu urbeto, la tiel nomata "*Florence Lorraine*" (Lorena Firenza), la atmosferon de la Renesanca periodo. Fakte, promenante, ni vidos domegojn kun belegaj fasadoj, kaj havos la eblecon admiru kelkajn skulptaĵojn, verkoj de la 16a jarcento.

Iom pri la historio de Saint-Mihiel

Oni trovis spuron de fora okupo de tiu loko, jam 3000 AJ. Ideala loko borde de la rivero, por ke tiu loko bone evoluu. Dum la franka regno kreiĝis la tielnomata vilaĝo *Godonécourt* dum la 5a/6a jarcento.

Proksime sur le mont, oni konstruis abatejon. Ĝi estas dediĉita al sankta *Mikaelo* (Saint-Michel). Dum la 9a jarcento, *Smaragd*, abato de Saint-Mihiel, rekonstruigas la abatejon borde de la riverego. Tie disvolviĝas la vilaĝon kaj *Godonécourt* iĝas *Saint-Mihiel* (misprononco de Saint-Michel).

Saint-Mihiel iĝas ĉefurbo de parto de la dukejo kaj sidejo de la duka justico. Pro tio multaj nobeluloj konstruis "hotelojn", kaj multaj religiaj ordenoj instaliĝas en la urbo. Sed la historio transformiĝas, kiam en 1635, la trupoj de la reĝo *Ludoviko la 13a* kaptas Saint-Mihiel. Post tiu milito sekvas pesto kaj malsato. Kvankam la urbo restas sine de la Lorena Dukejo, iom post iom, la urbo perdos ĝian kulturalan aŭtoritaton. Finfine, ĝi iĝas milit-urbo ekde la 19a jarcento. Komprenibile, kiel en la tuta departemento, la 1a kaj la 2a mondmilioj grave frapis Saint-Mihiel.

Nuntempe la urbo turniĝas al turismo. Iom post iom oni renovigas ĝin kaj provas valorigi ĝian kulturalan heredaĵon.

Dum nia promonado ni vidos du religiajn konstruaĵojn kaj belajn domegojn, spuroj de la antaŭa riĉeco de Saint-Mihiel.

1° - La abatejo Saint-Michel estis konstruita de la 11a ĝis la 18a jarcentoj.

Tiu impona abatejo konsistas el tur-pordego de la 11a, kaj de klasika konstruaĵo de la komenco de la 18a. Inter la 17a kaj la 18a jarcentoj, du abatoj, *Dom Hennezon* kaj *Dom Maillot*, donas al la abatejo spiritan grandecon : 14 preĝejoj en la regiono dependos de Saint-Mihiel, kiuj ne plu funkciis pro la Revolucio, ekde 1791.

Kadre de la abatejo, vizitindaj, kaj komprenibile viziteblaj dum nia ekskurso :

- *La benediktina biblioteko*, kiu entenas mirindajn librojn !

- *La muzeo pri religiaj objektoj* el la departemento, kiuj estas protektitaj tie, ekde 1998.

En la abatejo : *La perdo de konscio de la Virgulino*, verko de *Ligier Richier*.

Origine, tiu verko el nuksarbo estis kolorita. Temas pri grupo, parto de antaŭa "kruciĝo". Restas du personoj (la aliaj estis detruitaj dum la franca revolucio) : *Johano*, la apostolo, kaj *Maria*, la Virgulino, patrino de Kristo. Tiu verko montras patetikan situon : la apostolo, kiu retenas falantan Virgulinon ...

2° - *Saint Etienne* estas alia vizitinda preĝejo. Ĝi datiĝas de la 16a jarcento. Okcidente, parto de la preĝejo estis detruita dum la 19a jarcento por larĝigi la straton. Temas pri tipa hal-forma preĝejo : tri navoj el la sama alteco, sen transepto. En ĝi troviĝas alia vidinda belega, skulptita grupo de *Ligier Richier*, *La entombigo*, kiu datiĝas de la mezo de la 16a jarcento. Belega verko de la Renesanco, nepre vidinda !

Tiu majstra verko elvokas la lastan scenon ĵus antaŭ la entombigo de Kristo. Ĝi grupigas 13 personojn iom pli altaj ol nature. Meze, Kristo ripozante, portita de du olduloj. Tuj apud, *Maria Magdalena*. Malantaŭ, la Virgulino, falanta, subtenita de *Johano*. Proksime, anĝelo portante la pasiilojn. Iom pli for, maldekstre, alia virino preparas la tombon, kovrante ĝin per la preparita tuko. Alia grupo sur la dekstra flanko, du soldatoj ludas por scii, kiu inter ili gajnos la vestaĵon de Kristo.

3° - Surstrate, diversaj domegoj. Inter ili ...

- *La domo de la Reĝo*, datita el la 14a kaj 15a jarcentoj. Je tiu epoko tiu domo estis la plej granda domo de la urbo. Ĝi apartenis al iu tuko-majstro. La reĝo *René*, duko de Loreno, aĉetis ĝin en 1428. Ĝi restas duka bieno ĝis 1587. La fasado estas perfekte simetria. La pordego estas ornamita de kolonetoj. La tipaj fenestroj estas ogivaj. Tiu konstruo estas unu el la maloftaj urbaj gotikaj ekzemploj en - *La "hotelo" de Faillonnet* datiĝas de 1554 : tie loĝis la kreantino de la ordeno "*Sœurs de la doctrine chrétienne*". Tipa domo de la Renesanco, ĝi ankoraŭ posedas gargojlojn, kies similecon ni provos diveni.

Vi certe estos surprizitaj pro aparta fenomeno, kiu salutas vin, se vi venas en Saint-Mihiel el Verdun : la sep rokoj, *la Sep Damoj* de Saint-Mihiel. Temas pri restado de la pasinteco de nia Tero, kiam la maro kovris la regionon. La 4a rivelas tajlitajn sileksojn, kiuj atestas homan ĉeeston dum la prahistorio. En la 1a, eblas vidi kapeleton, kiu entenas verkaĵon de *Mangeot*, loka skulptisto de la 18a j. Temas pri Kristo en la tombejo.

Catherine GALLEGO

... survoje, dum nia malkovro de la urbo ...



« St - Sépulcre » - skulptaĵo de Ligier Richier




Bibliothèque bénédictine

... somera "itineraro" 2013 tra Rumanio ...
vizitindaj - kaj vizitotaj- urboj



Sibiu



Medias



Sighisoara

Benoîte-Vaux

anticipa supraĵa rigardo al nia printempa staĝejo



La nomo "*Benoîte-Vaux*" signifas "*Benita Valo*". Ĝi aperis por la unua fojo sur papa bulo datumita de 1180 kaj subskribita de la papo Aleksandro la 3a.

Kial tiu nomo "Benita Valo"?

Laŭ legendo tiu loko nomiĝis "*Martin Han*" (la loĝejo de Martin en lokala dialekto). Iutage, arbohakistoj malkovris piede de kverko statuon de la Dipatrino. Omaĝe ili konstruis kapeleton al dediĉita al la Virgulino. Tre rapide alvenis multaj pilgrimantoj. Oni do decidis pli grandigi la preĝejeton.

Laŭ la historistoj, ni estas en regiono, kiu estas pasejo de multaj invadoj. Nenio eksterordinara, ke statuo de sanktul(in)o estis enfosita kaj retrovita poste. Iuj el ili ne hezitas datumi la devenon de la virga sanktejo al galla kultejo. La statuo similas al diino de la fekundeco.

Episkopo de Verduno simple decidis kristianigi tiun pagan kultejon...

« La statuo »

La primitiva statuo malaperis dum incendio, kiu ruinigis la sanktejon en 1331. La plej malnova Madono, kiun posedas Benoîte-Vaux estas virgulino el ligno de la 14a jarcento. Dum la Renesanca periodo, oni skulptis alian statuon : majesta statuo, kronita de duka krono. La pilgrimoj daŭris ĝis la Franca Revolucio. Tial la statuo estis detruita. En 1793 oni retrovis la visagon kaj la manon de Jesuo tenante pomon. Ili estis adaptitaj sur la nuna statuo.

Se vi partoprenas la staĝon de Esperanto-France-Est, vi lernos iom pli pri tiu loko kaj la legendo rilate tiun statuon. Estos plezuro por ni rakonti tion al vi !

Catherine Kremer

NB – el la redakto : *Catherine Roux* tradukis la historion de la loko kaj Catherine Kremer (*Gallego*) gvidos vin tra la muroj de tiu sanktejo se vi deziras.



kial fiaskis nia projekto de poŝtmarko (pluaj klarigoj de Jean-Luc)

En Vandoeuvre, la 1an de decembro 2012,

Bonan tagon al ĉiuj !

Mi aldonas mian komenton pri la rifuzo de la Poŝto akcepti la kreadon de la persona poŝtmarko pri la *125a datreveno* de kreado de Esperanto. Mi petis de André kopion de la mesaĝo de la Poŝto, kiu indikas la kialon de la rifuzo, t.e. nebleco uzi vortojn el alia lingvo ol la franca.

Mi komprenas la konsterniĝon de ĉiuj, kiuj longtempe preparis la projekton. Pro tio mi deziris kontroli, ĉu la kialo de rifuzo validas. Mi do serĉis kaj trovis la konfirmon, kaj invitas la scivolemulojn ankaŭ kontroli ...

www.laposte.fr

Malsupre dekstre: *vos e-boutiques* ... Kliku sur « *boutique web de la Poste* »

Malsupre: *les services particuliers de la Poste*.

Kliku sur *boutique web du timbre - créer mes timbres*

Malsupre kliku sur *CVG (conditions générales de vente)* ... aperas tre longa teksto

CONDITIONS GENERALES DE VENTE

Iru malsupren ĝis *III Conditions spécifiques de « mon timbre à moi »*

... *Article 7 Garantie et exigences relatives au visuel fourni par le client à la Poste*

7-1 « le client choisit librement... et s'engage à ce que le visuel notamment ...

ne comporte pas des termes dans une langue autre que le français ».

La rifuzo estis do prava laŭ juro.

Oni povas kompreneble malsamopinii pri tiu artikolo 7. Ĝi tamen ankaŭ malpermesas uzadon de vortoj en lingvo alia ol la franca kaj ... ol esperanto. Ni kompreneble povas polemiki pri la uzo de aliaj lingvoj en reklamoj pri servoj de *la poŝtbanko*. Sed tiam, temas pri tute alia parto de la poŝata sfero, kiu obeas al tute aliaj juraj reguloj.

Sed kompreneble, se iu povas trovi privatan poŝtmarkon agnoskitan de la Poŝto, kaj havanta fremdlingvan tekston, tiam ni povos kontesti la rifuzon por la nia ».

Hipokriteco !
(aldonaĵo de la redakcio)

I ♥ L.A

(J'aime le Livret A)

Séjour roumain	Restado en Rumanio
<p>Un séjour original, pour un petit groupe, du 10 au 20 août 2013, pour découvrir une région de Roumanie remarquable, de <i>Sibiu</i> à <i>Sighisoara</i>.</p> <p>Séjour rustique en groupe chez des amis et/ou confort en chambre d'hôtes... Accueil simple et chaleureux au sein de familles roumaines.</p> <p>Programme varié : 10 jours de dépaysement partagé entre :</p> <ul style="list-style-type: none"> - visites culturelles, - randonnées adaptées, en moyenne montagne, (éventuellement randonnées à vélo). - découverte de la vie rurale, avec participation possible à certains travaux. <p>Echange et convivialité seront au rendez-vous !</p> <p>Les visites culturelles : entre culture latine et saxonne, nous partons à la découverte de trois villes et de plusieurs abbayes.</p> <ul style="list-style-type: none"> - <i>Sibiu</i> : musées, tour de ville, place remarquable, restaurée en 2007 (<i>Sibiu</i> capitale européenne de la culture) et ses vieux quartiers. - <i>Medias</i> : ses remparts, coup de foudre garanti pour son cadre médiéval ! - <i>Sighisoara</i> : classé au patrimoine mondial de l'UNESCO, son "quartier perché", connue pour son festival médiéval. <p>Aux alentours de <i>Medias</i>, nous logerons chez l'habitant. De là, nous pourrions découvrir villages typiques et abbayes.</p> <p>Soirées récréatives et musicales. Relaxation possible (facultative) et /ou yoga pour se détendre.</p> <p>Repas savoureux, sains et naturels.</p> <p>Tarif: de 285,00 € à 395,00 selon le type d'hébergement choisi.</p> <p>Nombre de places limité à 15 personnes.</p> <p><i>Ce séjour vous est proposé par le groupe Esperanto-Meuse, en partenariat avec l'association "Gradinitsa" (solidarités en Roumanie). Il est soutenu par Esperanto-France-Est.</i></p> <p>Réservation sous réserve de 50,00€ d'acompte</p> <p>(Nous pourrions donner des informations pour le voyage: voiture, avion, train ou car... et pour le versement de l'acompte) Contact:</p> <p>Lydia BLOCH 11, rue des Ducs, 55000 BAR-le-DUC tel. 03 29 77 19 42 lydiabloch@wanadoo.fr</p>	<p>Originalan proponon al vi : restadon en Rumanio, de la 10a ĝis la 20a de aŭgusto 2013, por malgranda grupo, en specifa regiono, de <i>Sibiu</i> ĝis <i>Sighisoara</i>.</p> <p>Kampanara restado ĉe geamikoj kaj/aŭ komforta en pensionoj ... Originala restado, simpla kaj agrabla akcepto en rumaniaj familioj, temas pri 10 tagoj da totala viv-ŝanĝo inter :</p> <ul style="list-style-type: none"> - kulturaj vizitoj, - adaptitaj pilgrimadoj, en mezalta monto, (kaj eble biciklo-promenadoj). - malkovro de la kampanara vivo, kun ebleco enpartopreni kelkajn simplajn laborojn. <p>Multfacetaj interŝanĝoj, evidente !</p> <p>Kulturaj vizitoj : inter latina kaj saksona kulturo, ni malkovros tri urbojn kaj kelkajn abatejojn.</p> <ul style="list-style-type: none"> -<i>Sibiu</i> : muzeoj, urba promenado, rimarkinda placo renovigita en 2007 (<i>Sibiu</i>, eŭropa ĉefurbo de la kulturo) kaj malnovaj kvartaloj. - <i>Medias</i> : remparoj, okulfrapa miro pro ĝia mezepoka kadro - <i>Sighisoara</i> : nomumita monda kultura heredaĵo far UNESCO, ĝia "alkroĉita kvartalo", famkonata pro mezepok-etosa festivalo. <p>Ĉirkaŭ <i>Medias</i>, ni loĝos en familioj. Ekde tiu urbo, ni malkovros tipajn vilaĝojn kaj abatejojn.</p> <p>Agrablaj, distraj muzik-vesperoj. Ebleco de rilaksiĝo kaj/aŭ jogo cele sanigan ripozon. . Nutraĵoj bongustaj, sanaj kaj naturaj.</p> <p>Tarifo : de 285,00€ ĝis 385,00€ laŭ la elektita trankonkato.</p> <p>Limigita nombro de la partoprenantoj : 15 homoj.</p> <p><i>La grupo "Esperanto-Meuse" proponas tiun restadon , kun la asocio "Gradinitsa », (solidareco en Rumanio) , projekto subtenata de Esperanto-France-Est.</i></p> <p>Rezervado post ricevo de 50,00€ kiel antaŭ-pago.</p> <p>(Informojn eblos pri la vojaĝ-eblecoj kaj sendo de la petita, anticipa ek-pago)</p> <p><i>Kontakto : vidu maldekstre</i></p>

Lingvofestivalo elzasa kaj afrika en COLMAR

Agrabla internacia plurlingveca renkontiĝo okazis dimanĉe, la 20-an de Oktobro 2012 en **Foyer Sainte-Marie**, en COLMAR. La aranĝon **majstre** organizis samideano **Fernando KINKANI**, kiel vicprezidanto de l'asocio **EURO-AFRIKA-SOLIDARECO**. Subtenis finance la partneraj asocioj CARITAS-ALSACE, Esperanto France-Est, TAKE-Esperanto kaj Mulhouse-Esperanto.

Helpita de pluraj esperanto-gelernantoj de sia asocio, li sukcesis prezenti interesan programon. Post la bonvenigaj vortoj de la prezidanto, Sinjoro **Blanchard BOKAPA**, intervenis la sekvaj prelegantoj :


- Sinjoro **Gérard CRONENBERGER**, urbestro de la urbeto INGERSHEIM, kiu prelegis pri la elzasaj dialektoj kaj ties situacio en la regiono. En lia urbeto startis antaŭ dekkvino da jaroj la unua privata dulingva lernejo en Elzaso, en kiu oni samkvante instruas la francan kaj la germanan lingvojn. La franca Nacia Eduksistemo nur pli malfrue – pro la premo de la gepatroj – proponis, kvazaŭ kontraŭvole, samajn dulingvajn ŝtatajn klasojn.
- Sinjoro **Bienvenu SENE MOGABA** prelegis pri siaj klopodoj krei la necesan vortaron por instrui ĥemion en la lingvo **LINGALA**, en la Demokrata Respubliko KONGO.
- Sinjoro **Jozefo CHIRIMWANI SIRONGE**, kiu ankaŭ originas el DRK, prezentis Esperanton. **ĝian kreinton, la cirkonstancojn de la invento kaj la nunan staton de la lingvo, la barojn de la franca registaro, ktp.**

Je la 12a, ni kune manĝis en apuda manĝo-salono. Impresa nombro da pladoj estis prezentitaj sur du tabloj, la receptoj estis el diversaj landoj : eŭropaj ,aziaj kaj afrikaj pladoj sukeritaj aŭ salaj. Ni prenis teleron kaj servis nin je ĉio dezirata kontraŭ pago de 10 eŭroj por manĝi tre diverse, ekzote kaj pli ol ĝissate. Laŭ mia scio, la pladoj estis preparitaj fare de asocioj de afrikanoj kaj surlokaj helpantoj. Ni estis sesdeko da personoj kaj la duono estis afrikanoj ! Tre bona miksaĝo !


Post la manĝo revenis al la mikrofono **Bienvenu SENE MONGABA**. Li lerte plurakontis pri siaj spertoj de instruisto de la fako "kemio" en mezlernejo en Demokrata Respubliko Kongo. Li estis devigata instrui en la franca lingvo, sed li ofte konstatis, ke la lernantoj ne bone komprenis ĉion pro lingvaj problemoj. Li do provis klarigi denove en la loka lingvo, la lingala*, kaj tuj la gelernantoj komprenis . Poste li pripensis : "Ĉu nia nacio volas eduki spertulojn pri kemio, kiuj povos helpi al la ekonomia progreso aŭ ĉu la nura celo estas la instruado de la franca ? Mia konstato estas, ke instrui en la loka lingvo, estas la bona solvo."

De tiam li verkas instru-libretojn aŭ librojn por klarigi multajn aferojn en la lingala lingvo.

Li tre bone konscias, ke la superuloj, kiuj tie regas, desupre ne konas la problemojn kaj ne povas kompreni lian sintenon, sed li opinias, ke lia laboro utilas. Li diris : "Ĉu la registaro uzos aŭ ne mian laboron, tion mi ne scias, sed mi faros tion, ĉar ĝi mi opinias ĝin utila. Eble en la estonto aliaj registaroj estos pli favoraj."



*1er Festival
de langues
Afro-Alsa-Espérantophone*



Foyer Sainte-Marie
14, Rue Maimbourg COLMAR
20 Octobre 2012
 De 9h30 à 18h30
(avec possibilité de restauration sur place)

Organisé par l'Association Euro-Afrika-Solidareco COLMAR
 Contact : 0649685070 ou 0623188876 euroafrika.solidareco@yahoo.fr

Fernando KINKANI intervenis por konfirmi la utilojn de la loka lingvo. Li mem provis instrui esperanton al afrikano pere de la franca. La afrikano komprenis malbone. Renato Corsetti donis al Fernando kurson de esperanto en la lingala lingvo, kaj tuj la lernanto komprenis ĉion. Impresis ankaŭ la intervenoj de Roberto KUENY, kiu parolis pri siaj vojaĝoj tra Skandinavio helpe de Pasporta Servo, kaj pri sia restado en Togolando, kie li vizitis la ZAMENHOF-INSTITUTON. Ĝi estas kolegio, en kiu ĉiuj gelnantoj lernas Esperanton.

Poste Sinjoro CRONENBERGER ree parolis pri la stato de la elzasa lingvo en Elzaso .500 000 personoj daŭre parolas ĝin, sed plejparte tiuj homoj ne plu estas junaj. Ĉe la plej junaj nur 3 % parolas ĝin.

Kvankam 320 teatraj trupoj ludas teatraĵojn en la elzasa. Tio estas nur ŝajna vigleco , ĉar malmultaj junuloj ĉeestas la spektaklojn. Kial tiu manko de entuziasmo ? Certe pro la dua mondmilito. Kiam Hitler aneksis Elzason en 1940, li tuj uzigis devige la germanan. Post la milito la franca ŝtato instigis al uzo de la franca lingvo kaj en la lernejoj aperis sloganoj kiel « Il est chic de parler le français – Mojosas paroli la francan ». Tial la elzasanoj ne volis esti konsiderataj germanoj - fakte nazioj – pro iliaj ĝermanaj dialektoj. Ili volis esti « veraj francoj » ! Krome oni primokis ilin pro ilia akĉento kaj multaj hontis.

Sed pluraj ĉeestantoj atestis, ke por ili la elzasa lingvo estas lingvo de la koro, ĉar ili ricevis ĝin de la ŝatata patrino aŭ avino ; plie ĝi tre helpis por la kompreno de la germana normata lingvo. Nun pluraj asocioj batalas por la plua kreo de dulingvaj klasoj de la bub-lernejo ĝis la bakalaŭro, sed ĝis nun nur 10% de la gelnantoj vizitas tiajn klasojn, kio estas malgranda nombro kompare kun la situacio en Eŭskio, Bretonio aŭ Korsiko. Pro la malbona scio de la germana lingvo, multaj gejunuloj elzasaj nun ne povas esti dungataj en Germanio, kie mankas laborfortoj kaj ili kreskigas la nombron de la senlaboruloj francaj.

Krom la prelegoj kaj diskutoj estis diversaj informtabloj kaj paneloj:

- * Social-helpa agado de *Caritas* en Francio;
- * *Asocio Kephaz Père Etienne*, Colmar, kiu agadas en Afriko por subteni strato-infanojn, ret-adreso: www.conakryhoffnungstern.eu ;
- * *Esperanto-France-Est* kun informiloj kaj libroj;
- * *Esperanto-Freiburg & AVE* kun informoj la projekto Mazingira en Tanzanio: www.verduloj.org, kie ankaŭ troviĝas aktuala raporto de Mazingira;
- * Kulturo de Afriko kun lignaj statuetoj, KD-oj kun muziko, kaj interesa afiŝo, kiu montras la mapon de Afriko kun la 10 plej gravaj lingvoj tie.

Je la fino okazis prezentado de afrika muziko kun man-tamburoj kaj dancantoj; la ege ritma muziko instigis moviĝi - ankaŭ la sidintojn. Estis bela finaĵo.

Kia bela tago !

Koran dankon al Fernando kaj liaj helpantoj !

Raporto de *Ginette MARTIN*, *Edmond LUDWIG* kun aldonoj de *Manfred Westermayer*



La lingala estas bantua lingvo parolata en Demokratia Respubliko Kongo, en Respubliko de Kongo-Brazzaville kaj parte en Centrafrika Respubliko de proksimume 30 milionoj da personoj.



... ni enpartoprenu ! ...

08 - 13. aprilo 2013 - **NILVANGE** (Loreno)

5-a Esperanto-Semajno en la « *kastelo de Nilvange* », Francio.

Kursoj por komencantoj, progresantoj, konversacia kurso, prelegoj, filmoj, ekskursoj ĉe la tri landlimoj *LU, FR kaj BE*. Malmulte kostaj ĉambroj kaj manĝaĵoj.

Kunorganizas.: *Esperanto-Thionville* kaj *Franca Fervoĵista Esperanto-Asocio*.

Informas : Bruno HENRY, 8 rue Pasteur, FR-57240 Nilvange, Francio. Telephone: 09 52 28 15 98

rete: esperanto-thionville@laposte.net

retejo: <http://www.esperanto-thionville.ass0.fr>

08 – 13 avril 2013 - **NILVANGE** (Lorraine)

5-ème Semaine d'Espéranto au « *château de Nilvange* », France.

Cours pour débutants, cours de perfectionnement, cours de conversation, conférences, films, excursions dans la la région transfrontalière *LU, FR et BE*.

Chambres et restauration à prix très doux.

Organisateurs: *Esperanto-Thionville* et *l'Association Française des Cheminots pour l'Espéranto*.

Informations : Bruno HENRY, 8 rue Pasteur, FR-57240 NILVANGE, France. Tel.: 09 52 28 15 98,

courriel : esperanto-thionville@laposte.net

site web: <http://www.esperanto-thionville.ass0.fr>

VORKUTA ... le charbon du Goulag !

Conférence*** - diaporama et chants

de Mickaël BRONSCHEIN, barde russe espérantophone

le Mardi 29 Janvier 2013, à 20h15 au *Gueulard*, 14 rue Clémenceau

Organisée par *Esperanto-Thionville*, *le Forum des Citoyens* et *le Gueulard de Nilvange*.

*** ... voici Vorkuta !...

Dans les années trente du siècle dernier, des géologues ont trouvé du charbon de qualité près de la rivière *Vorkuta* au-delà du *Cercle Polaire*. Le charbon, nécessaire à l'industrie nationale, a fait de cette région nordique une partie du Goulag de triste mémoire... La voie ferrée et les premières mines de charbon lancées là, coûtèrent des milliers de vies humaines. Le conférencier, qui a lui-même travaillé dans ces mines pendant neuf ans, présentera un récit riche de contenu, accompagné de ses propres chants et diapositives de cette région loin de tout.



Staĝo de esperanto en Ortenberg (DE)

21-22-23ajn de septembro 2012

La staĝo okazis en mirinda kastelo, situanta sur monteto, kaj impreso alta.

Tamen malgraŭ la aspekto de fortreso, ĝi estas luksa kastelo, kiun la riĉaj posedantoj en la pasintaj jarcentoj konstruis por la plezuro kaj por impresi la najbarojn. Malantaŭ la monteto etendiĝas vitejoj, kaj suno bele



brilas.

La avantaĝo estis la beleco de la kastelo kaj la plezuro (aŭ la iluzio) ĝui princa vivon dum 3 tagoj, tamen la malavantaĝo estis, ke ni devis ofte uzi ŝtuparojn.

Ne hazarde tiu kastelo etis preskaŭ donacita al la asocio de junular-gastejoj ; oni devas multe gimnastiki inter la etaĝoj.

Princa vivo haltas, kiam ni devas purigi telerojn kaj mem zorgi pri la preno de manĝo en niajn telerojn, kiam ni devas ordigi la salonetojn laŭ la bezono aŭ ne bezono de seĝoj. La salonoj estas uzataj por la manĝoj kaj por la lecionoj kaj prelegoj.

Ni do multe gimnastikis ! Tamen la etoso estis bonega. Entute ni estis ĉirkaŭ 43, francoj estis triono de la partoprenantoj, do sufiĉe bona miksaĵo por ne krokodili.

La manĝo estis sana kaj sufiĉa, ne diboĉe granda.

Vendrede vespere, jam kelkaj grupoj havis kursojn. Alia grupo devis roli ĵurnalistojn. Ni intervjuis nian najbaron kaj poste devis publike prezenti lin / ŝin. Tiu devigis nin interesiĝi al nia najbaro kaj fari trafajn demandojn, preni notojn kaj aŭdaci paroli publike.

Sabate matene okazis denove kursoj de du niveloj, kaj prelegoj : de *Manfred* pri la stacidomo de Stuttgart kaj de *Frank Huber* pri la starveturiloj (star, ĉar oni staras sur ĝi ; francoj nomas ĝin *gyropode*) : historio de tiu invento, funkciado, nomo de la diversaj partoj.

Posttagmeze okazis 3 distraĵ-ebloj : uzo de la starveturiloj en Strasburgo dum du horoj, pied-vizito de la urbo por alia grupo (ĉar la ŝipo estis trop plena, la antaŭvidita ŝipa vizito de la urbo sur la Ill ne okazis).

Tria grupo vizitis tre interesan subĉielan muzeon de malnovaj farmdomoj.

Vespere, *Tereza Kapista* prezentis fotojn pri antaŭaj vojaĝoj en Burundio kaj Irano. Tre surprizis min ŝia energio kaj vicleco. Oni ne povas kredi ke ŝi aĝas 82 jarojn.

Poste *Rotraud* (kiun mi malĝuste nomis Irmtraud en antaŭa raporto) kantigis nin kaj akompanis nin gitare.

Dimanĉe matene, denove okazis kursoj kaj alia grupo vizitis la malpermesitajn partojn de la kastelo kun « ĉambelano », kiu rakontis germane la tutan historion de la kastelo kaj diversajn anekdotojn. Frank Huber tre bone tradukis ĉion al esperanto.

Mi forgesis diri, ke ni spertis renkonton kun alia grupo (muzikistoj) ; de ili ni aŭskultis belan muzikon per trumpetoj, kaj ni profitis por iom reklami ĉe ili por esperanto.

Jean-Luc trovis lokon por prezenti parole kaj fizike la librojn de la libro-servo.

Ni fine ĝuis riĉan programon kaj belan etoson en domo aparte luksa, ĉe kiu ni devis adaptiĝi en malgranda spaco, sed la bonvolo de ĉiuj faris tiun staĝon tre sukcesa.

Parenteze, tiu domo estas de longe rezervita kaj tre petata. *Inge* devis pagi por supozata nombro de partoprenantoj, sen antaŭkoni, kiom ĝi estos. Kaj ŝi ne ricevas kompenson por la troe petitaj lokoj. Sed peti tro malgrandan nombron povintus konduki ŝin al rifuzo, kaj tion ŝi ankaŭ timis. Tiu situacio ne estis komforta por ŝi.

Dankon al la organizintaj germanoj !

Ginette

rekte el nia libroservo

Okcitanio prikantata de PATRIC !



Jen nova belega produkto de *Flo MARTORELL* kaj lia skipo !

PATRIC ja kutime interpretas siajn kanzonojn en la okcitana kaj en la franca, sed same plaĉos la traduko al Esperanto. Cetere : sur la akompana libreto vi malkovros multajn konatajn nomojn de la teamanoj, kiuj kunlaboris al la realigo de tiu rava kanzonaro ! Delikate akompanas PATRIC koruseto kaj ege talentaj muzikistoj ! 15 kanzonoj mediteraneecaj, kiujn vi certe aŭskultos sinsekve kaj tuj reaŭskultos !



Okcitanio : Vinilkosmo, KD, *Patric*, 15 kanzonoj – **18,00 €**

Paradizo ŝtelita : romano, *Trevor Steele*, FEL, 336 paĝoj – **19,20 €**

Ie pri io : Esperantumado, *Tereza Kapista*, 160 paĝoj – **16,00 €**

Asteriks kaj Kleopatro (denove disponebla) : bildstrio, *Gosciny / Uderzo*, Dargaud – **12,00 €**

La templo de l' suno (ĵus aperis) : aventuroj de Tinĉjo, Esperanto-France ISBN, 62 paĝoj – **12,50 €**



Por mendi librojn

1 Vi sendas vian mendon per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo, 37 rue Pierre et Marie Curie, 54500 VANDOEUVRE

per e-poŝto al libroservo.efe@wanadoo.fr

2 Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3 Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al libroservo 2800-76 H NANCY (indikante la numeron de la fakturo) aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo de « libroservo », sendita al la adreso de la libroservo.

... Kiala fideleco je Esperanto ?...

«...Kial mi venis kaj restas fidela al Esperanto ? Ĉar oni mokis min, kiam mi diris, ke mi volus scii pli pri la afero Esperanto. Mi pensas, ke mi havas kavaliran menson (fakte pli kiel *Don Kihoto* - do kiel iom freneza klaŭno - ol kiel vera nobelo). do se estas io, pri kio oni ne havas - laŭ mi - la ĝustan vidon, mi adoptas ĝin kaj sentas min devigata batali por ĝi.

Mi ankoraŭ nun ne komprenas, kial homoj perdas tempon por ekspliki al mi (eĉ kiam mi diris, ke mi parolas, legas kaj skribas Esperanton !...), ke Esperanto fuŝis, ne funkcias, estas malsukceso, ne permesas esprimi la sentojn http://fr.wikipedia.org/wiki/Anglais_basic , eĉ

ktp.kaj ne plu estas parolata kaj estas ankoraŭ pli stulta aĵo kaj eĉ pli danĝera afero ol *basic english*...

Mi opinias, ke oni riĉiĝas dank'al Esperanto, sed temas pri riĉeco, kiu ne perdas valoron, ne putriĝas, ne estas ŝteblebla, ne eniras en sumon por kalkuli impostojn. Estas vera riĉeco, kiu feliĉigas.

Do mi povus diri al la politikistoj (eĉ se mi preferus ne paroli al ili, ĉar ili ne plu kapablas aŭskulti) : karaj, dum vi faras monon, mensogojn, promesojn, trompadojn, gajnon de baloto, ni, esperantistoj, konstruas alian mondon, mondon de kvalito en komunikado, rilato, kuna vivo, kaj ni jam gajnis, ni ankoraŭ pli gajnos por la feliĉo de tiuj, kiuj deziras esti feliĉaj, kaj ni bedaŭras por la perdintoj, kiuj preferas esti malfeliĉaj. Por mi nur danke al la simpla fakto de la ekzisto de Esperanto ni atingis la finan venkon. Poste, se la plej granda parto de la homaro ne volas esti feliĉa, do pace komuniki, rilati, vidi, domaĝe por ili.

Mi ne estas *finvenkisto*, kaj ĉefe tute ne *raŭmisto* (mi fakte ne komprenas, kaj ne volas kompreni pri kio temas, sen skribi pli), sed mi estas *vivigisto*. Mi provas vivi Esperanton parolante, legante kaj skribante ĝin.

Mi fakte ne povas malesperi pri io ajn, ĉar unue, kiel vi scias, mi estas la plej feliĉa homo de la mondo (mi fakte - iom provokeme kaj/aŭ memmoke - skribis tion) kaj mi nun iomete komprenas Esperanton, do mi fine sukcesis ion lerni en mia vivo, kaj tio feliĉigas min (ankoraŭ pli feliĉa, do).

De la politikistoj mi nenion esperas ! Tamen, se ili povus evitigi militon, tio jam estus bonega afero ...

... et si on le disait ?...

Notre rédacteur en chef a tenu à prendre ses distances quant à certains propos de *Monsieur Marc ROUSSET* (LA INFORMILO N° 159). J'ai, moi aussi, été étonné de découvrir qu'il n'estimait pas nécessaire de mettre le provençal et le berbère dans la liste des langues à option au baccalauréat.

Je suis personnellement très heureux que le provençal, une des nombreuses langues de France, soient dans cette liste. Et pourquoi ne permettrait-on pas aux Français d'origine berbère de renouer avec leur langue, qui, soit dit en passant, est devenue en juin 2011 la deuxième langue officielle du Maroc. La pratique de la langue des parents et des grands-parents des jeunes immigrés les empêcherait-elle de s'intégrer en France ? Non, elle leur offre une chance supplémentaire d'ouverture par-dessus les frontières. C'est bien en France que de nombreux maîtres à penser continuent à nous faire croire que le bilinguisme n'est pas possible ! Nous en savons quelque chose en Alsace ! Croyez-vous vraiment que nos langues régionales empêcheront qui que ce soit de parler le français ?

Et puis : la liste des langues non-européennes en option au baccalauréat est longue. Pourquoi Monsieur Rousset en veut-il au berbère ?

Il est même certain que l'adoption de l'espéranto comme moyen de communication internationale permettrait aux élèves de nos collèges et lycées de choisir en plus grand nombre la langue qui leur plairait, que ce soit une langue régionale, la langue du voisin ou une langue plus exotique, car deux années scolaires seraient amplement suffisantes pour maîtriser la Langue Internationale. Certains mettraient d'ailleurs encore moins de temps !

Ceci dit : merci à Monsieur Rousset de promouvoir l'espéranto, le français et les autres langues ! Il a bien raison aussi de donner l'exemple de la lente adoption du système métrique pour illustrer la progression de l'espéranto.

Edmond LUDWIG

Président d'Espéranto France-Est

Je suis cependant étonné de constater qu'il ne connaît pas notre littérature, nos poètes, romanciers et essayistes ! Ne sait-il pas qu'un grand nombre d'entre eux sont membres du *PEN-CLUB INTERNATIONAL*, et qu'ils choisissent leur candidat au *prix Nobel de Littérature* ?

 témoignage
Informcele :

Al la dosiero de la « *propedeŭtika valoro de Esperanto* », por la eklernado de fremdaj lingvoj, endus eble aldoni jenan ateston de unu el miaj ekslernantoj, kiun mi havis en la franclingva sekcio de la Marliceo en De Haan (Belgio).

Germain PIRLOT

"Via pasio por la franca kaj Esperanto estis tre komuniquebla kaj, ĉe mi, ĝi esprimiĝis per la amo al lingvoj, al ĉiuj lingvoj ! Post studado en la Supera Instituto de Tradukistoj kaj Interpretistoj, mi vivis dum preskaŭ 18 jaroj en Hispanio, kun longaj restadoj en Britio, Italio, Francio kaj Germanio. Mi parolas la hispanan, la anglan, la nederlandan kaj sufiĉe bone la italan, la germanan kaj la katalunan; krome mi konas kelkajn vortojn de la vaska kaj de la indonezia (la azia Esperanto).

Mi vere opinias ke grandparte tio fontas el tiu finstudada laboro pri Esperanto (ekzameno de matureco), kiun mi realigis kun via helpo. Nun mi estas Komerca Direktoro en eta MME [Meza kaj Malgranda Entrepreno], kiu surmerkatis maŝinojn, industriajn aparatarojn kaj ilarojn por drato- kaj kablo-fabrikejoj. Enkadre de mia laboro kaj preskaŭ ĉiutage, mi estas devigata paroli tiujn lingvojn menciitajn ĉi-supre, sen paroli pri la multaj vojaĝoj, kiujn mi devas fari ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Afriko, en Azio kaj en Sud-Ameriko".

Luc S. - 09.10.2012

Info

Au dossier de *la valeur propédeutique de l'espéranto* dans l'apprentissage des langues étrangères, il serait peut-être judicieux d'ajouter le témoignage de l'un de mes anciens élèves de la section francophone au lycée maritime à De Haan (Belgique)

Germain PIRLOT

« Votre passion pour la langue française et pour l'espéranto était très communicative, et chez moi elle s'exprima sous la forme de l'amour pour les langues, pour toutes les langues ! Après des études dans l'Institut Supérieur de Traducteurs et d'Interprètes, j'ai vécu pendant près de 18 ans en Espagne, avec de longs séjours en Angleterre, en Italie, en France et en Allemagne. Je parle l'espagnol, l'anglais, le néerlandais et assez bien l'italien, l'allemand et le catalan ; je connais en outre quelques mots de basque et d'indonésien (l'espéranto asiatique).

Je pense vraiment que je dois tout cela en grande partie à l'étude sérieuse de l'espéranto (examen de maturité), grâce à votre aide. En ce moment je suis Directeur Commercial dans une PME qui vend des machines, des appareillages industriels et de l'outillage pour des usines de fils de fer et de câbles. Dans le cadre de mon travail, et ce presque tous les jours, je suis obligé de parler les langues mentionnées ci-dessus, sans parler des nombreux voyages que je dois faire non seulement en Europe, mais aussi en Afrique, en Asie et en Amérique du Sud. »

Luc S. - 09 10 2012

ni gratulas !

PREMIO DEGUĈI AL URSULA KAJ GIUSEPPE GRATTAPAGLIA



Ges-roj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia ricevis la ĉi-jaran Premion Onisaburo Deguĉi. La Estraro de UEA aljuĝas tiun "esperantistan pacpremion" pro agado, kiu per Esperanto antaŭenigis internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de D-ro L.L. Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. La Premio estis starigita en 1987 per donaco de Oomoto; ĝi konsistas el diplomo, monsumo de 2000 eŭroj kaj donaceto de Oomoto.

Ges-roj Grattapaglia laboras ekde 1974 volontule en Brazilo en la bieno-lernejo *Bona Espero*, esperantista eduka institucio por infanoj en socia risko. De multaj jaroj ili agas en la *internacia Rotaria movado* favore al Esperanto. Ili aktive kontribuis por la videbligo de Esperanto en *Rio+20*, la konferenco de UN pri daŭripova evoluo, kiu okazis en Rio-de-Janeiro en junio ĉi-jare, 20 jarojn post la unua tia konferenco en 1992, en kiu ili ankaŭ aktive partoprenis.

La decido pri la premio estis anoncita en la Solena Fermo de la 97-a UK en Hanojo. Ĉar ges-roj Grattapaglia ne povis veni al tiu UK, la Premio estos transdonita al ili en la Itala Esperanto-Kongreso, okazonta de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto en *Mazaradervalo*, Sicilio.



Flo MARTORELL ricevis la ĉi-jaran FAME-premion (3.000 €) !

En 1988 Alois Meiners starigis la fondaĵon *FAME* por subteni la Esperantan kulturon, enkadre de kiu ĝi aljuĝas "*Kultur-premion FAME*" kun aldona sumo de 3000 eŭroj - la plej alta premio-sumo en la Esperanta mondo.



.La ĉi-jaran premion ricevis *Floréal Martorell*, por siaj meritoj rilate al Esperanta muzika kulturo! La transdona ceremonio okazis en la urbo *Aalen*, en kadro de solena festo kun subteno de la urba administracio.

La festprelegon faris konata germana esperantisto, eksperto-

Peter BALÁŽ, Esperantisto de la jaro 2012

La slovaka esperantisto *Peter Baláž*, kunordiganto de la asocio *E@I*, estis elektita Esperantisto de la jaro 2012 en la ĉiujara voĉdonado, kiun ekde 1998 okazigas *La Ondo de Esperanto*. La sekreta elekto okazas en du ŝtupoj: unue grupo de 15 proponantoj nomumas kandidatojn, poste alia grupo de 15 elektantoj voĉdonas por tiuj. Ĉi-jare estis entute 21 kandidatoj, el kiuj 15 ricevis almenaŭ unu voĉon. Estas diskonigitaj nur la nomoj de tiuj kandidatoj, kiuj ricevis minimume tri voĉojn.



La gajninto, *Peter Baláž*, ĉi-jare ricevis sep voĉojn. Po kvin voĉojn ricevis *Hori Yasuo* kaj *Stefan MacGill*. Kvar voĉojn ricevis la redaktoro de *Libera Folio*, *Kalle Kniivilä*. Po tri voĉojn ricevis *Mireille Grosjean* kaj *Perla Martinelli*.

Laŭ la motivigo publikigita de *La Ondo de Esperanto*, Peter Baláž ricevis la distingon pro *starigo, evoluigo kaj prizorgo de gravaj retaj projektoj; modela kunlaboro kun landaj kaj Eŭropaj instancoj; okazigo de la Somera Esperanto-Lernejo kaj de la scienca konferenco KAEST; eldono de gravaj diskaj, libroj, broŝuroj kaj filmoj en/pri Esperanto; kaj pro tio, ke li sukcesas stimuli kaj (re)aktivigi multajn talentajn gejunulojn, kiuj sen tio eble perdus intereson pri Esperanto.*

Pasintjare kiel Esperantisto de la jaro estis elektita *Dennis Keefe*, en 2010 la distingon ricevis *Katalin Kováts*, kaj en 2009 la redaktoro de *La Ondo de Esperanto*, *Aleksander Korŝenkov*.

Pasintjare kiel Esperantisto de la jaro estis elektita *Dennis Keefe*, en 2010 la distingon ricevis *Katalin Kováts*, kaj en 2009 la redaktoro de *La Ondo de Esperanto*, *Aleksander Korŝenkov*.




NADZJEJA

-3/4

Pri VAŜINGTONA INTERKONSENTO :

« *Ununura potenco gravas en la mondo.* »

Kiu estis tiu ĉampiono pasintan jarcenton ?

 <p>Lasta jarcento</p>	 <p>Nuntempe</p>	 <p>Venonte</p>
<p>Kiu estos? Ĉar Okcidento forlasas plurjarcentan mondregadon profite al alia ...</p>		



... potenca pugno



Ĉu savringo por la mondo atingeblas ?



Je kio plue fidi ?



Je **HOMRAJTOJ** kaj **ESPERANTO**, kiel Nadzjeja !

A.Hubert

NADZJEJA

-4/4

Pri VAŜINGTONA INTERKONSENTO :

« *Ununura ekonomika kaj financa sistemo sukcesas.* »

Sukcesas ? Ĉu nur perlaborante ?




... aŭ aĉgajne lukre forprenante ŝtele rabe amasante staplante vorante kaj ankaŭ poluante difektante subpremante mortigante?

La nuna sistemo sukcesis malsanigi nian mondon.



Florinde !

Ve! Savringo por la mondo ŝajnas ne atingebla !



Sed per



Nadzjeja faras paŝon al pli bona interkompreniĝo.

A.Hubert

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2012. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2013 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2013 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT ?

1. Association Régionale ESPÉRANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse. *Ex. Abono Inf + kotizo 2013 por 756*
- par chèque bancaire à l'ordre de **Espéranto France-Est**, mais adressé à notre trésorier:
S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.

Abonnement et cotisation pour les années:	2013	2014	2015
Abonnement à La INFORMILO adresse en France	15 €	15 €	15 €
adresse à l'étranger	18 €	18 €	18 €
Adhésion à l'Association Espéranto France-Est (à rajouter à l'abonnement)			
<i>Cotisation fédérale</i>	7 €	7 €	7 €
<i>Cotisation fédérale de soutien avec reçu fiscal pour bénéficiaire de 66% de réduction d'impôt</i>	20 €	20 €	20 €
<i>Même cotisation pour les membre de UFE</i>	16 €	16 €	16 €

2. Association Internationale UEA (cotisations 2013)

Les cotisations à l'UEA peuvent être payées directement à notre association Espéranto France-Est par l'intermédiaire de notre trésorier S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM qui transmettra dans les meilleurs délais.

Veuillez noter le code de la cotisation que vous payez. (cotisation UEA MA)

U	Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	MG	10 €
	Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA	MJ	25 €
E	(+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30 ans)	MJ-T	25 €
	Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO	MA	61 €
A	(+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	MA-T	61 €

3. Association Nationale Espéranto-France (UFE) (cotisations 2013)

Les cotisations à l'UFE sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: - 855-35-D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2012 de l'UFE. **Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.**

Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.

U	Membre actif d'Espéranto-France (avec reçu fiscal)	39 €
	Membre actif d'Espéranto-France et d'Espéranto-Jeunes. (moins de 30 ans au 1.1.2013)	30 €
F	Tarif réduit pour étudiants, chômeurs	15 €
	Première année	10 €
E	Cotisation pour un couple (avec reçu fiscal)	78 €
	Abonnement au magazine bimestriel Le Monde de l'espéranto.	+18 €

IMPORTANT

- Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association.
- Les cartes de membre de l'année 2013 et éventuellement de l'année 2014 seront envoyés aux autres membres d'**ESPERANTO FRANCE-EST** par courrier séparé avec des informations spécifiques réservées aux membres.
- Les membres payant une cotisation fédérale de soutien ou un don en 2012 recevront un reçu fiscal pour bénéficier de 66% de réduction d'impôt pour la déclaration à faire en 2013.

Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse.

Une cotisation fédérale de 20 € vous est proposée. Elle permet de déduire 60% des impôts. Ainsi vous n'aurez payé que $20 - 66\% = 6,80$ € mais votre association aura reçu 20 €.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2013 ĝis 2015

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevitaĵoj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevitaĵoj en 2012 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2013.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2012, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

Jaroj:	2013	2014	2015
Abono por adresoj en Francio:	15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
<p>Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2013 por 1208</p>			
<p>Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2013, 2014 ktp. Se necese menci vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.</p>			
<p>Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)</p>			
<p>Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adreskodon)</p>			

J A R KOLEKTO DE TAKE 2012

Ĉi tiu Jarkolekto de TAKE 2012 estas la oka kajero de la serio, kiun Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE) eldonas. Per la eldonado TAKE celas internacian interŝanĝon de spertoj kaj ideoj pri konstruado kaj arkitekturo kaj la evoluigon de la ĉi-rilata faklingvo en Esperanto.

JARKOLEKTO de TAKE 2012 estas belaspekta libreto en formato A5 kun 52 paĝoj. Ĝin redaktis Pierre Grollemund el Francio. Kvar aŭtoroj kontribuis per artikoloj por tiu teknika verkaĵo. Ĝin ricevis ĉiuj membroj de TAKE. Ĝi estas ankaŭ aparte akirebla por 6 eŭroj (sendkostoj inkluzivitaj).

ENHAVO

ASTANA, la ĉefurbo de KAZAĤIO kun ties domegoj kaj monumentoj
Pierre Grollemund

Tero, teraĵo, grundo, argilo, lomo *Jan Werner (CZ)*

Plu pri dom-konstruaĵoj el lomo *Pierre Grollemund*

La stacidomo de COLMAR *Pierre Grollemund*

La romia akvodukto de la valo "GIER" *Leo de Cooman Marie-Josèphe Farizy-Chaussé*

Interparolo kun *Bernard LAPONCHE* Traduko
Pierre Grollemund

S21 - Fervoja projekto – en-terigo de la stacidomo Stuttgart Hbf
Manfred Westermayer (DE)

Nia propono: se vi pagas 12 eŭrojn, vi ricevos la JARKOLEKTON de TAKE 2012 kaj estos membro de TAKE por la jaro 2013.



JARKOLEKTO DE TAKE 2012



L'Union de Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wittenheim Francio

...ni prouu  rideti !...

Kial do nur « blondulinoj » daŭre rolas en anekdotoj ? Mistero ! Nu, bonvolu legi...

Du junaj blondulinoj, kiuj deziras akiri diplomon por fariĝi dumsomere helpantinoj dum ekskursoj per etaj velboatoj, estas petataj -konkreta testo- mezuri alton de masto. Post starigo de eskalo, kun mezurbando enmane, ili provas vane, unu post la alia, atingi la mastopinton !

Preteriranta viro, proponas sian helpon... «Nu, mi estas inĝeniero kaj konas simplan metodon por malkovri la rezulton...».

Iom scivolemaj kaj skeptikaj, la du inoj konsentas. Rapida manipulado piede de la masto ebligas ĝin kuŝigi horizontalen.

Helpe de la prunteprenita mezurbando, kvin sekundojn poste, li anoncas la rezulton ... Mutas ironie la du inoj, sed tamen gratulas la helpinton, kiu foriras.

« Jen, tiuj inĝenieroj eldiras unu, la alton ni bezonis, kaj tiu stultulo la longon kalkulis ! ».



Sidante rante la eta lito, iu patrino, dezirante ekdormigi sian etulinon, dolĉe kantas lulmelodion. Sekvas dua kaj tuj poste tria... Tiam pridemandas la infaneto : « Manĝo, ĉu nun mi rajtas ekdormi ?... aŭ eble plukanti vi volas ! ».



Aŭsca !

Instruistino en elementa lernejo petas siajn gelnantojn redakti etan tekston, kies titolo estus :

« Mia patro brikolas* » ...

Johaneto verkis kelkajn liniojn :

« Cele festi la patrinojn, mi desegnigis buntan pejzaĝon, kiun manĝo aprezis kaj kiun ŝi enkadrigis !... Paĉjo deziris fiksi ĝin ĉe muro en ilia dormoĉambro sed li fuŝe martelis dum la laboro, kaj manĝo devis vindi lian montrofingron... »

Bedaŭrinde, manĝo malpermesis al mi skribi tion, kion li ekkriis dum la devojiĝo de la martelo ! ».

* brikoli (neologismo) : plenumi neprofesie diversajn etajn taskojn, ofte helpe de diversaj iloj.



Franca turisto promenas en ardena* arbaro, kaj hazarde renkontas du ĉasistojn, kiuj penas haŭli enorman apron. Ambaŭ ŝvitegas pro la malfacila tasko... Profitante la ĉeeston de la neatendita vizitanto, ili flanke lasas la beston por iom paŭzi.

« Belega kaptajo, ĉu ne ?... gratulas la alvenanto.

- Prave ! Temas pri mirinda masklo ! ... fiere atentigas unu ĉasisto, viŝante sian frunton ... Mi suspektas, ke li pezas minimume 180 kilogramojn ! ».

Plena de kompato je la du ŝvitantaj viroj, la turisto proponas...

« Mi ne estas ĉasisto, sed ŝajnas al mi, ke se vi tiras la beston, tenante la dentegojn preferu al la voston, vi spertos malpli da laceco ! »

- Nu... Kial do ?

- Ĉar haŭlante tiamaniere tian bestegon, tio okazos je la direkto de la felharoj, kaj sekve ĝi glitos pli facile ! ».

Certagrade dubemaj, ili tamen provas sekvi la konsilon... kaj, mirige, la monstro kvazaŭ senprobleme glitas sur la jam sekigitaj arbofolioj.

Ili dankas la turiston kaj ekiras.

Post dek minutoj, unu ĉasisto alparolas sian kunulon :

« Necesas ja konstati !... Niaj najbaroj estas ja inteligentaj ! »

- Prave, jen neatendita eltrovaĵo... sed diable, ĉu ci ne rimarkas, ke ni pli kaj pli malprokimiĝas el la veturilo ? ».

*ardeno : ĉi-tie temas pri vasta arbaro, kiu etendiĝas ambaŭflanke de la landlimo inter Belgio kaj Francio.



Apotekisto devas momente foresti kaj petas sian helpanton prizorgi la dezirojn de la kilentoj.

Iom poste li revenas kaj informiĝas... « Ĉu ĉio glate disvolviĝis ? »

- Nenia problemoj... Nur tri klientoj. La unua plendis pri kapdoloro. Aspirinon mi sugestis al li.

- Bone !

- La dua, iu virino, suferis pri digesto-malagrablaĵo. Al ŝi mi konsilis fenugrekteon...

- Pefekte !... Kaj la tria ?

- Temis ankaŭ pri virino, kiu heziteme alproksimiĝis al mi kaj flustris : « Jam delonge mi ne vidis viron ... ». Al ŝi mi vendis efikan kolirilon... ».

Iu blondulino renkontas survoje amikinojn ... harbrunan.

Ŝi kaptas la okazon por peti konsilon, cele malfacilan vendon de sia malnova veturilo. Fakte, la fakekrano rivelas 245 000 km-ojn !

« Ĉu vi eventuale konsentus solvi la aferon neleĝe ? »

- Kial ne ?

- Nu, vizitu mian amikon Toni, kiu laboras en garaĝ-ateliero ... Dank' al li, la fak-ekrano elmontras nur 50 000 km-ojn ! ».

Iom poste la du amikinoj denove renkontiĝas. Scivole pridemandas la brunulino:

« Ĉu vi sukcesis vendi vian aŭtomobilon ? »

- Stultajon ! Kun nur 50 000 km-ojn, mi ankoraŭ longtempe uzos ĝin ! ».



Franca turisto, sportisto, kiu frandas la tiel nomatan « salton per elasta kablo », vizitas Marokon.

Li decidis salti el la pinto de la urba minareto, kie li gastas.

Tiucele, li aĉetas la necesan uzotan materialon, t.e. risortobuklo, ŝultrozono kaj 25 metroj da kablo el kauĉuko.

La sekvantan posttagmezon, antaŭ ansia homamaso, li surgrimpas la minareton kaj senhezite saltas malsupren... La kablo rigidiĝas, haltigas la viron je 50 cm-oj de la grundo kaj rejetas lin supren. Enorma aplaŭdado.

La morgaŭon, Mohamed, admirinto, deziras montri sian kuraĝon. Li aĉetas la necesan materialon, grimpas ĝis la pinto de la minareto, ordigas la « hungilaron » sur sian trunkon, kiel petite, kaj saltas ...

Katastrofo ! Li frakasiĝas sur la grundo !...

Policisto enketas kaj pridemandas la fakvendiston:

« Kion vi vendis al tiu malfeliĉulo ? »

- Tutsaman materialon kiel mi havigis al la franca turisto ... Sed ĉar la patro de Mohamed estas amiko de mia familio, mi aldonis senpage 5 metrojn da kablo el kauĉuko... ».



jarfina konkurso

Du bonŝanculinoj estos lotitaj inter la legantoj, kiuj estos donintajn bonajn solojn de la enigmoj.
Ili ricevos libron el nia libroservo (solvoj atingu la redakcejon antaŭ la 31a de januaro 2013

1 - ŝmilblik

Jen ĉi-sube humura asertaĵo de la franca humoristo kaj aktoro *Patrick Timsit*. Bedaŭrinde, pro malica koboldo kaŝita en la klavaro, ĉiu litero de la esperanto-alfabeto iĝis alia dum la tajpado ! Ekzemple, ĉiuj **a** finiĝis **f**

j z b t f k c / r s z / m f t / r s z / ŝ z v l k f a / s
 f / a ĝ b s ĝ b s t / a c o / j z t f k c / m z / m k c o
 f a / m c / s f / a ĝ b f ĝ b s t / o c / s f / r k z m a
 z v f / t f k z / t f v / f s u c ŝ z a

2 - krucvortenigmo (dankon al nia kontribuanto Joël Grandjean)

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1											
2			■				■				
3					■				■		
4											
5						■					■
6			■						■		
7					■						
8		■					■				
9								■			
10					■						■

- HORIZONTALE**
- Osto de la kranio.
 - Pronomo. Kolekt' de leĝoj. Besta kri'.
 - En la centro de dorso. Tute sen vokaloj.
 - Presita skribaĵo por komuniki ion.
 - Inversa proza verk'. Rilata al verkado.
 - Sufikso. Estu akceptata ĉe la tablo.
 - Litera nomo.
 - Paperfoliar' kun presita teksto. Opun-
tioj.
 - Mortiga infekta malsan'. Numeralo.
 - Fonetism'. Superhoma estaĵo.
 - La 90a radioaktiva element'. Konserv-

- VERTIKALE**
- Scienca stud' de la maroj.
 - Perforte forkapti homon. Litera nomo.
 - Objektiv' de kamerao. Grenŝel'.
 - Bildrepertuar' pri difinita homo.
 - Litera nomo. Meze de vicrado. Regnoko-
do de Burundo.
 - Statu' honorata per kulto. Dividiĝ' de
unu eklezio en du.
 - Kursanta sen interrompoj. Simbolo de
mikro.
 - Ĝen' kaŭzita de amaso de objektoj tra
vojo.

3 - silabenigmo

- + - - + - - multekosta ornamaĵo
- + - - + - - mita reĝo de Itako
- + - - + - - mola parto de frukto
- + - - + eŭropa komerc-firmao
- + - - + - - ekzistanta tute interne
- + - - + - - granda kvanto
- + - - + maloportuna, malagrabra
- + - - + - - malrapida muzikpeco
- + - - + - - sendorsa sofo



Helpe de la ĉi-subaj vorteroj alfabete ordigitaj,
malkaŝu la kaŝitajn vortojn.
La du krucumitaj kolumnoj, vertkale legataj,
eldonos proverbon de Zamenhof

ada am aso di dl ĝe ĝo in iso ju li lo
ma na no po pul ti ve va

... el nia fototeko ...



Sukcesis la 20a internacia Eo-semajno en Cambriels - foto A. G.



Ĝojiga evento por Henri Masson en Moutiers-les-Maufraits



Fruktodona seminario/staĝo en la kastelo de Ortenberg ...



... kun malkovro de Strasburgo per « star-veturilo » !



D-ro Zamenhof senvaligas memortabulon « Place de L'Esperanto » en Choisy-le-Roi



Ĉambelano vizitigas la kastelon ! Interpretas Frank Huber



Roberto Kueny, senlaca prozelito de nia lingvo !



Nederlando memorigas la « naskiĝon » de Esperanto